



ISSN 1886-1997

Kajeroj el la Sudo

La 30^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/hale/k99.html>

ISSN 1886-1997 (Reta versio) ISSN 1886-1938 (Printita eldono)



Ĉu li puĉis
aŭ kontraŭ-
puĉis?

N^o 99^a

Aprilo 2018

Kajeroj**el la Sudo**

Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).

Calle Jabonerías, 6.3° D
30010 Murcia
Hispanio

ISSN 1886-1938
(1886.1997 rete)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**
Redaktas: **Jesuo de las Heras.**
Korektas: **Jozefo Pina.**

Enhavo

Redaktore: UK.....3

Supren Hispanio! Vivu la
Respubliko!..... 4

Ĉu puĉo?..... 8

La peko de l' taliban'..... 10

La Faraono, ĉ. 48^a..... 16

Dekses tunoj..... 23

Retskribu al: **kajeroj@gmail.com**

Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe,
ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties
aŭtoroj, ne la redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon,
kiun ni trovos interesa kaj kies enhavo
mistraktas nenium personon.

Kovrilo: La 23^a de februaro de 1981 leŭtenanto-kolonelo Antonio Tejero Molina kaj ducent policianoj forrabis la tutan deputitaron hispanan en sia sideo. De tiam multe da demandoj ankoraŭ atendas respondon.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

Konto **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Poste, sendu noton al **kajeroj@gmail.com**

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.

Tute verkita kaj kompilita per senpagaj linuksaj rimedoj: OpenOffice Writer, Gimp, Scribus kaj Bluefish.



Nesubskribitajn
artikolojn
verkis la
redaktoro.

Redaktore

UK

Jam alproksimiĝas la dato, kiam geesperantistoj el tuta mondo kunvenos. Ek de Lilo mi ne kongresumas, ĉar mi trovas tiom multajn kialojn ne kongresumi, kaj samtempe kongresumi. Tamen, mi trovas du ekstrajn kialojn, ĉifoje, por iri: Ĝi estas proksime de mi, kaj temas pri Lisbono, la bela urbo.

Eble mi retrovos bonajn amikojn, kiujn mi ne vidas de antaŭ longe. Se ili ne mortis, kompreneble... Tio estas kialo ne kongresumi: oni trovas bonajn geamikojn tie, ĉe kongresoj niaj, kaj post kelkaj jaroj ili mankas al ni, ĉar ili jam mortis. Kiel Dimitar Terziev, ekzemple, la ĥorestro, aŭ Ĝordano Moja, la verkisto..., kaj multaj aliaj.

Sed Ĉifoje ni kongresumos fronte al Atlantika Oceano, kaj espereble ni revenos kun plenpleno da bonaj memoraĵoj pri niaj novaj geamikoj kaj samideanoj, kune kun kongresa rezolucio, kiu estos bela toasto al Sun', kiel ĉiuj ili kutime estas. Ĉu Esperanto Kongreso estas bono por niaj vivoj?

Nu, eble jes. Sed eĉ se ne, jen bela maniero pasigi la tempon uzante nian belan lingvon.

Antaŭ nelonge okazis la

datreveno de la puĉo kontraŭ tiu ĉi memnomita Demokratio hispana, kiun ni prikomentas je paĝo 8^a. Politikan sintenon ankaŭ estas artikolo sur antaŭaj paĝoj, kiu estis titolota Ĉu lingvaj mensogoj estas grandaj, malgrandaj, gravaj, ne-gravaj?, sed fininte la tekston, ŝajnis pli taŭge unuigi la du sloganojn, de dekstro kaj maldekstro hispanaj. Eble iam ni kunhavas komunan senton pri tio, kion oni pridiskutas per tiu artikolo, kaj paco kaj komprenemo regos la spiriton de la hispanoj.

Je la paĝo 10^a ni legos la 6^{an} ĉapitron de mia libro La peko de l' taliban', kiun oni povas legi kompleta ĉe mia retejo, kaj kiun mi aldonas ĉi tie por tiuj, kiuj deziras legi ĝin paŭze, kune kun mi.

Finas la kajeron la ĉapitro 48^a de la verko de Boleslaŭ Prus, en traduko de Kabe, La Faraono, en paĝo 15^a.

Mi esperas, ke vi pasigu belan tempon legante nian magazinon, kaj se vi, leganto, havas ideon plibonigi venontan numeron (nia 100^a!), bonvolu sciigu al mi pere de retadreso kajeroj@gmail.com.

La Redakcio

Supren Hispanio!

Vivu la Respubliko!

Ĉu oni akceptus, ke oni diru, ke televido disvolviĝis multe laŭ la lastaj du jarcentoj, kaj oni nepre devas respekti televidon, ĉar ĝi ja havas propran personecon, ĝi efikas, multe pli ol antaŭe, kaj televido havas siajn rajtojn, kiujn homoj ne povas neglekti, rifuzi aŭ vundi?

Imagu, ke oni povus rezoni simile pri aŭtoj, aviadiloj, kaj eĉ pri simplaj tenaĵoj! Absurde, ĉu ne? Tamen, se oni konsideras lingvon, la afero tute ŝanĝas...

Ĉar oni diras, ke lingvoj disvolviĝas, kvazaŭ tion ĝi farus per si mem. Jes, mi scias, ke oni jam prenis tiun nocion kvazaŭ ĝi venas el Biblio, kiun oni ne rajte povas kontesti. Tamen, mi trovas ĝin tute falsa: kio estas lingvo, krom komprenilo? Lingvon oni inventis eĉ ne por literatura arto (eĉ se ĝi estas sekvo el la arto paroli, kiun ne ĉiuj kapablas havi). Precize pro tio, ke oni ne parolas arte, efike aŭ kohere, precize pro tio, ke oni fuŝe parolas, la uzon de la lingvo oni vere ŝanĝas iom post iom, tagon post tago. Poste venas akademianoj, kaj konstatas, ke jam okazis ŝanĝoj, kaj ili priskribas ilin kaj kolektas sur libroj doktaj. Kelkaj homoj konsideras poste, ke pro tio, ke Akademio prezentas tiujn ŝanĝojn en sia vortaro, oni jam povas plenrajte uzi ilin kiel korektajn, forgesante, ke vortaro estas nur kolekto da vortoj, kiujn homoj uzas, senrigarde al tio, ĉu ili estas korektaj, ĉu ne. Sed kio estas korekta vorto, kio ne? Ĉiu lingvo havas proprajn leĝojn kaj regulojn, kiuj venas, efektive, el uzo amasa. Sed la ĉefa celo de lingvo estas interkomprenigo, kaj pro tio mi opinias, ke ĉiu obstaklo al interkomprenigo estas nekorekta trajto de lingvo. Pro tio la nocio korekta aŭ nekorekta vorto ne estas klara, kaj estas tre granda nenieslanda zono inter ties vortaroj (pri korektaj kaj nekorektaj vortoj). Sed ververe, korekta uzo de lingvo estas tia, kian ĉiuj povas kompreni facile.

Apuda bildo prezentas lingviston germanan de la 19^a jarcento, Franz Bopp'n,



kiu unue parolis pri Indoeŭropeo, lingvo el kiu venas ĉiu konita lingvo. Ŝajne tiu penso venas el religia nocio, ke Dio kreis Adamon kaj Evon, kaj donis al ili sanktan lingvon. Sed historio rakontas al ni, ke kiam du nekonatuloj unue renkontas, ili provas interkomprenigi unu la alian per iu ajna rimedo, kaj ankaŭ oni lernas el tiu disciplino de scio, ke kiam estas malkonsento inter du homoj, estas batalo, kaj unu el ili du ĉu mortas ĉu fuĝas. Kaj fuĝintoj post nelonge parolas diverse al tiuj,

kiuj igis ilin fuĝi. Ankaŭ estas eble, ke kverelo estis pli frua ol apero de lingvo, kaj sekve diversaj lingvoj aperas post kverelo kaj fuĝo, kaj pro tio pralingvoj estas neniel rilatintaj unu la alian. Do, se ne estas pruvite, ke Dio kreis Adamon kaj Evon kaj donis ununuran lingvon al ili, ankaŭ ne estas pruvite, ke dekomence ekzistis nur unu lingvon, el kiu venas la aliajn. Jes, Franz Bopp estis grava sciencisto, kiu inventis la Komparitan Lingvistikon, sed li ne estus la unua sciencisto, kiu grave eraris. Lingvo povas esti multegeneza.

Ankaŭ oni komprenu, ke lingvon ne inventis peco da tero, sed homo. Homo, kiu plej verŝajne venis el alia loko. Pro tio estas nenio sankta en lingvo, kaj nenio magia ankaŭ. Lingvo venas el bezono kompreni unu la alian, kaj se oni pledas ion pli, oni mensogas aŭ eraras (laŭ ties intenco, kiun mi ne juĝas nun). Sekve, terpeco havas nenian rilaton al lingvo, sed al agrokulturanto, eĉ se klimataj kondiĉoj povas ŝanĝi la karakteron de homoj, kaj tio eble povas ŝanĝi ties vortaron kaj eble eĉ manieron esprimi sin, sed tamen eĉ se jes, tio estas neniel magia aŭ sankta trajto pri lingvo. Se homa komunumo konkurencas al aliaj, apudaj homaj komunumoj, unu el ili venkos la aliajn, kaj disvastigos siajn manierojn fari aferojn, paroli kaj kompreni vivon, kaj eĉ religion, tio estas, sian kulturon.

Tion faris diversaj kulturoj tra pra- kaj historio, kiel romianoj kaj angloj, por citi nur du ekzemplojn pri malsamaj manieroj sekvi tiun procezon: la unuaj akceptigis siajn kulturon kaj lingvon al submetitaj popoloj, ŝanĝe al plibonigo de ties vivmaniero, kaj eĉ finfine akceptante la individuojn de tiuj popoloj kiel romiajn civitanojn, tiel, ke hodiaŭ multaj popoloj fiere pledas, ke ili devenas el romianoj, kaj ebligante, ke homoj el tiuj subpremitaj popoloj iĝis imperiestro de Romio, kiel Teodosio, ekzemple. Sed la britoj nur postulis el siaj subpremitoj la lingvon ĉie ajn, sen permesi, ke ili iĝu plenrajtaj civitanoj britaj, sed nur de tiu nebula afero, la Brita Komuna Riĉeco, aŭ Commonwealth. Fakte britoj prenis krudajn materialojn el siaj kolonioj, rafinis ilin en Britio, kaj poste disvendis ilin en la kolonioj. Pro tio kelkaj historiistoj dubas, ke la Brita estis vere Imperio, sed simpla koloniismo.

La hispana kazo, tamen, estis kaj kaj: post Kristoforo Kolombo malkovris novan kontinenton, multaj aliaj hispanoj faris la amerikojn, tio estas, vojaĝis tien malkovri kaj konkeri novajn landojn por la Reĝino Isabel' de Kastilio. Inter ili ĉiuj ni menciis nur du: Hernandon Kortezon kaj Fransiskon Pizaron, kies komuna trajto estis, ke ili konkeris tutan imperion amerikan pere de malmultaj soldatoj. La unua facile konkeris Aztekan Imperion, kaj la dua, la Inkaan, ĉe la aktualaj teritorioj de Meksikio kaj Peruo, respektive. Sed kiel ili povis fari tion? Ĉu per miraklo de la Dioj de la blankuloj, kiel aztekaj pastroj

kredis? Verŝajne dioj ne kulpas aŭ meritas krediton pro tio, sed la fakto, ke imperio baziĝas sur subpremadoj de aliaj popoloj. Se la imperio poste integrigas tiujn popolojn en sian propran kulturon kaj lingvon, ĝi longe vivos, kiel la romiana vivis, fakte dum preskaŭ du mil jaroj; sed indianaj imperioj faris la saman eraron, kiel la britoj faris poste: ili subpremis, sed ne integrigis subpremitojn en siajn kulturojn, kaj pro tio, kiam subpremitoj vidis veni tiujn homojn sur ĉevaloj portante pulvajn armilojn, ili pretis helpi la kastilianojn venki la aztekojn kaj la inkaojn. Sed poste ili uzis siajn du sekretajn armilojn, kiujn oni ne klare komprenis eĉ hodiaŭ: kunhavo de kaj kulturo kaj religio al liberigitaj indianoj, laŭ rektaj decidoj de la reĝino mem: laŭ ŝiaj teritorioj, ĉiuj homoj, ĉu indianoj, ĉu hispanoj, havos samajn rajtojn kaj devojn. Sekve, indianoj lernis la hispanan lingvon, kaj pere de la katolika religioj, ili komprenis, ke ili estas parto de la universo, kiu disvastiĝas multe pli larĝe ol iliaj konitaj horizontoj, kaj plue eĉ en pretervivon.

Tiutempe nek Germanio, nek Italio, eĉ nek Britio ekzistis kiel tiuj, regolandoj, kiujn oni konas hodiaŭ, Aragon' kaj Kastili' jam unuiĝis kaj disvastiĝis laŭ Maro Mediteraneo kaj la tuta Nova Kontinento. Fakte ili ĉiuj havis ununuran sintenon, kaj la emon integriĝi novajn popolojn en siajn sinojn, male al turkoj kaj angloj poste, kies emon estis anstataŭi la popolojn, kies landojn ili rabis peforte. Oni ne bezonas fosi multe en la historion de Usono aŭ Irlando trovi tion, kaj se ili ne sukcesis fari tion en Bharato, tio ne estis pro bonkoreco, sed pro la simpla fakto, ke bharatanoj estis tro multaj, kaj la britoj tro malmultaj, kaj la afero estis simple nefarebla. En Sudafriko ili tamen sukcesis krei sistemon, kiu kaptis indiĝenojn for de la blanka socio ĝis la tria kvarono de la 20^a jarcento, eĉ se la loka blanka oligarkio sukcesis sendependiĝi el metropolo multe pli frue ol tiu apartismo (triste konita per sia angla formo, apartheid).

Multe oni mensogis, kaj ade mensogas, ekster kaj eĉ en Hispanio pri la Hispana Imperio. Dum britoj havis koloniojn, hispanoj havis provincojn de ununura lando. Pro tio oni parolas ankoraŭ pri La Hispanioj, sed neniu eĉ pensus pri tiu nocio, La Britioj aŭ La Anglioj, ĉar eĉ hodiaŭ oni parolas pri skotoj, kimroj kaj angloj kiel diversaj homoj. Jes, veras, ke en Hispanio ja estis diversaj regolandoj dum la rekonkero de la teritorio el invadintoj muslimaj, sed ili iom post iom sukcesis unuiĝi politike, eĉ la tute sendependaj kristanaj reĝolandoj Nafaro, Asturio kaj Valensjo, krom Aragono kaj Kastilio.

Pro tio ŝajnas moko, ke la neniam sendependaj regionoj Vaskio kaj Katalunio nun havas politikistojn, kiuj nomigas ilin historiaj komunumoj, kaj deziras, ke ili sendependiĝu el Hispanio. Sed naciismo ne havas koherecon,

ĉar ĝi ĉiam estis frenezaĵo. Naciistoj asertas mensogojn kvazaŭ ili estas vero. Ili penas inventi historion, eĉ sciante, ke ili mensogas. Sed tio nur pruvas, ke nun Hispanio ricevas la pagon el sensenca misfaraĵo de memnomitaj demokrataj registaroj lasi en manojn de mensogaj naciistoj la edukadon de novaj generacioj en regionaj komunumoj. Ili senkompate ricevadis la mesaĝon pri tio, ke hispanoj estas fiuloj, kiuj iam invadis tiujn mirindajn naciojn, Vaskion kaj Katalunion, kaj nun endas, ke oni forpuŝos tiujn fiajn hispanojn el sia sankta terpeco. Ili svingas la roho-sangotrajon en Vaskio, dum en Katalunio ili svingas nur sian apartan dialekton latinan kiel pruvon, ke ili estas apartaj popoloj. Tamen, popolo fontas el nacio, kaj la kataluna aŭ vaska nacioj tute ne ekzistas. Nacio havas ŝtaton, kiel poloj aŭ judoj sukcesis rehavi post jarcentoj da malapero pro avareco de najbaraj Germanio kaj Rusio, kaj misfaro de romianoj, respektive. Sed nek katalunoj nek vaskoj estis forpeltitaj el siaj landoj. Nur okazas, ke ili neniam havis propran landon krom nacioj de Hispanio. Kaj ankaŭ ŝajnas, ke ili ne komprenas, ke sia propra subteno dependas el aparteno al Hispanio, ĉar la cetera parto de nia lando estas la ĉefa merkato de tiuj du regionoj hispanaj, kaj forlasi Hispanion signifas forlasi la Eŭropan Komunumon kaj fermo por sia merkato. Tiun lecionon ŝajnas kompreni ankoraŭ nek ekziliĝintaj nek enprizonigitaj politikistoj, Karlo Puĝdemont' kaj Orjol' Junqueras kune kun ties sekvantoj. Ilin blindigas la sopiro havi sian propran nacion sen la balasto de la cetera parto de Hispanio, eĉ se por atingi tion ili devas subpremi pli ol duonon de la loĝantaro de Katalunio, forrabante ties teritorion, ĉar ili decidas, ke nenaciistoj ne estas katalunoj kaj sekve ili estas fremduloj en la lando, kie ili naskiĝis de kelkaj generacioj. Verŝajne por katalunistoj demokratio estas devigi al plimulto la kapricon de la malplimulto. En sia ignoranteco, ili nomas sian estontan, deziratan nacion, La Kataluna Respubliko, nesciante, ke respubliko esence signifas la afero de ĉiuj, eĉ de tiuj, kiuj ne volas tian respublikon, kaj tiu fakto malebligas, ke ekzistos tia respubliko.

Sed vere nur eblas estigi veran respublikon en


Hispanio bezonas respublikojn, tio estas, homoj, kiuj laboras por venigi kaj daŭrigi la Respubliko.



Ĉu puĉo?

Je la 23^a de februaro de 1981 mi estis en la unua jaro de mia trijardeko, kaj mi, same kiel ĉiuj aliaj hispanoj estis trompitaj de amasmedioj, kiel kutime pro tio, ke mi ankoraŭ kredis, ke ĉio, kion mi vidas, kion oni vidas, estas vera.

Bedaŭrinde, mi konstatas nun, tio estas nur miraĝo. De tiam mi jam lernis, ke demokratio ne estas tio, kion oni marteladas ĉiutage el la tuta revuaro eŭropa (jes, ne nur hispana), kaj libereco, egaleco kaj frateco (se iu ajn deziris aŭ kulturis la lastan iam ajn) estas nur referencpunktoj, same kiel justico aŭ bono, kiujn oni priparolas, sed neniu sukcesis vidi ankoraŭ. Tia kia estas, mi jam priparolis ofte en la paĝoj de Kajeroj el la Sudo, kaj certe revenos pri la penso fojfoje, sed nun la temo estas la puĉo de 1981. Tiutempe oni disvastigis la ideon, ke kelkaj fiaj civilgvardistoj ribelis kontraŭ demokratio, sed feliĉe ni havis demokratian reĝon, kiu haltis la puĉon per li mem, sen iu ajn alia helpo, kvazaŭ li estu moderna superman'. Sed estas kelkaj faktoj, kiuj ŝajnas kontraŭdiri tion.



Generalo
Alfonso
Armada
Comyn,

Dekomence, Reĝo Johano Karlo I^a ne tuj reagis, sed atendis kelkajn horojn antaŭ decidi tion, kion fari. Dekomence li kunvenigis la sekretariojn ministeriajn por ke ili daŭre funkciigu la ŝtaton plej efike kiel eble, dume. Poste, Generalo Armado vizitis la ribelintajn civilgvardistojn en Parlamento Hispana. Ili diskutis kelkajn minutojn, kaj poste Generalo Armado telefonis la reĝon, kiu siavice telefonis Generalon Milans'n del' Bosç', milita estro de la Valensja regiono, kiu hejmenigis la surstrate patrolantajn tankojn, kaj poste estis arestita, same kiel leŭtenant-kolonelo Tejero Molina. Kion li diskutis kun Generalo Armado, kaj tiu ĉi



Johano
Karlo, reĝo
de Hispanio
pro la graĉo
de Francisco
Franco

kun la reĝo? Kial la Reĝo ne agis unue, sen tio, ke tiuj militistoj diskutu ion ajn?

Nu, iel ajn, antaŭ la puĉo oni nomis la reĝon Johano Karlo la Mallonga, kaj tuj post tiu evento, li iĝis La moderna, demokratia reĝo... Georgo Simeno'n' estis verkisto, kiu en siaj noveloj dirigis sian detektivon, ke la krimulo estas tiu, kiun la krimo plejfavorigas. Ĉi kaze mi trovas, ke la tuta afero favorigis la reĝon de Hispanio kaj sian dinastion.

Eble Hispanio estas monarĥia lando, eĉ se mi tion ne ŝatas... Ni devas alfronti la faktojn, kaj ne erari pri manioj aŭ ideologioj propraj, sed ankoraŭ ne certas, ke Hispanio ne estas respublika. La maniero scii tion estas referendumo pri ĉu monarĥion, ĉu respublikon ni volas. Sed ĝis nun ĉiuj registaroj de Hispanio estis tro malkuraĝaj fari tion, pruvi al ni, ĉu nia popolo estas monarĥia, ĉu ne. Ĉar monarĥio komencis en nia lando perforte, dekomence la visigota armeo, kiu fondis la elektitan monarĥion (kiam reĝo mortis, la nobeluloj elektis novan reĝon inter ili mem). Poste muslimoj prenis kaj forprenis siajn reĝojn dum sep jarcentoj, kaj finfine la kristanaj reĝolandoj aperis ankaŭ perforte kontraŭ muslimoj kaj kontraŭ unu la aliajn.

La du respublikoj, tamen, venis sen milito. Sed ili ne bone funkciis, kaj je la fino de la unua oni denove petis reĝon veni, kaj la dua kondukis al intercivitana milito pro tio, ke oni ne sekvis la respublikajn principojn, ĉefe tiun, ke laŭdifine respubliko estas la afero de ĉiuj. Tamen, la gvidanto de Partio Respublika, S-ro Azanjo, poste Prezidento, diris, ke la respubliko estas por ĉiuj, sed devas esti regata nur de respublikanoj. Tio respegulis la sektecan ideologion de tiuj faŝismaj partioj, kiuj elkore kredis, ke ili estas pli plenrajtaj ol aliaj homoj, kiuj havas aliajn ideologiojn.

Dum la 19^a jarcento okazis diversaj puĉoj armeaj, kelkaj el maldekstra emo, sed nun oni kondamnas nur tiun sukcesan, kiu kondukis al Diktatoreco de Generalo Franko. Ĉu sektismo, partianeco, netoleremo?

Dum kelkaj opinias, ke la ribelo de civilgvardistoj je 1981 estis la plej malbona puĉo en nia historio, ne mankas tiuj, kiuj opinias, ke la plej grava puĉo estis la starigo de la nuna Hispana Konstitucio de 1978, pro tio, ke oni ne redaktis ĝin nome de la popolo Hispana.



Generalo Emilio Mola, iniciatinto de la puĉo je 1936 en Hispanio.

La Faraono

La peko de l' taliban'

6 Geedziĝo.

Zorajd' sentis sin stranga. Tiu viro diris al ŝi que estus bone edziĝi al ŝi. Li estas tre aĝa homo, multe pli aĝa ol ŝi. Li havis, laŭ lia aspekto, kvin dek jarojn, preskaŭ trifoje ŝia aĝo. Sed ŝi ne devis dubi pri la decidoj de Dio, kaj pri tiuj de sia amata patro. Zulem', ŝia patrino, dirintis al ŝi, ke Aben' Abdala', la plej riĉa viro en la urbo, volas edziĝi al ŝi. Kaj ŝi ne scias nun pri tio, kion fari. Sed ŝi esperas, ke sia patrino, kaj ĉefe sia patro, klarigu al ŝi. De tiu tago ŝi demandis al ili multe da aferojn pri tio, kion li diris al ili, ĉar ŝi volas kompreni lin pli bone. Ne estis objetoj, sed klariglotaj demandoj.

Vizitoj de ŝia fianĉo iĝis pli oftaj, ĉar li venis ĉe ŝi unu aŭ dufoje semajne, se nun li portis manĝaĵojn, kelke da ili ekzotikaj, kiujn ŝi neniam antaŭe vidis, kiel samarkandajn pavojn. Ili gustumis tre dolĉe, kaj ili ne venas el Uzbekio, evidente, sed ilia raso venis origine el tiu fora lando. Li ankaŭ enportis daktilojn, kiuj estas ŝia plejŝatata deserto.

Laŭ veno kaj foriro de monatoj, ŝi konis pli bone tiun viron, kiu tiom multe malplaĉis al ŝi la unuan fojon, kiam ŝi vidis lin. Ŝi dekomence opiniis, ke li estas aroganta kaj tromemfida, eĉ pli patrineska ol sia propra patro. Sed ŝi konstatis, ke li havis multe da pacienco kaj pieco. Ŝi ĉiam parolis pri aliaj homoj kun tiom da komprenemo, kompatante ilin, ke finfine ŝi konkludis, ke tio, kion ŝi kredis memfido estis vere kompatato kaj malaprobo samtempe: homoj faras maldecajn agojn pro tio, ke sia turpeco igis ilin kredi, ke tio feliĉigas ilin, sed li kompatas ilin, ĉar ilia malfeliĉo venas el tiuj agoj.

Post dudek monatoj, ŝia patro diris tiel al ŝi tuj post legi al ŝi pri la devoj de edzino, kiu Dio decidis, laŭ La Libro Sankta:

«Filino: vi jam estas klerigita virino, kaj estas mia deziro, ke vi edziniĝu. Aben' Abdala' estas bona homo, kaj li



iĝos bonan edzon por vi, kaj kiam viaj gepatroj jam mortis, li aŭ filo lia zorgos pri vi».

«Jes, patro».

«Ĉu vi ne volas?»

«Mi volas tion, kion vi volos, patro. Kaj kion Dio volas, ĉar ankaŭ li estas mia patro».

«Saĝaj vortoj, filino. Sed ĉu vi amas lin?»

«Patro, por ami lin, mi devas koni lin, kaj mi ne konas lin sufiĉe bone».

«Bone. Vi prudenta estas. Sed vi scias, ke post geedziĝo vi estos lia por ĉiam».

«Jes, patro».

«Kaj ĉu tio ne timigas vin?»

«Ne, patro. Se li estas via amiko, li certe estas bona persono kaj zorgos pri mi bone».

Zulem' ĉeestis tiun ĉi intervjuon kun granda agrablo. Ŝi ne povis eviti memori kiam, dudek jarojn antaŭe, ŝia propra patro parolis al ŝi simile. Sed ŝi diris tiam al sia patro, ke ŝi ne amas lin. Ibrahim' estis nur dek jarojn pli aĝa ol ŝi kaj ŝi ne volis viron tiom aĝan por naski gefilojn kaj vivi kun li. Sed ŝia patro estis nefleksebla: Ibrahim' estas bona homo, laborema, kaj zorgos pri ŝi kiam li, la patro, ne plu estos. Tiel okazis. Ŝia patro mortis antaŭ kvin jaroj, kaj ŝia edzo ekzorgis pri sia bopatrino kaj tre junaj bofratoj, kiujn li lernigis sian metion kaj ili jam estas sukcesaj komercistoj. Sed Zorajd' respondis per citaĵoj de La Libro Sankta anstataŭ la protestoj, kiujn ŝi estis dirantaĉe tiam, kaj per submetiĝo anstataŭ larmoj, malgraŭ la fakto, ke la proponata edzo triobligis ŝian aĝon. Zulem' ne bone fartis la tagon de sia geedziĝo, kaj la unuan fojon, kiam Ibrahim' prenis ŝin estis terure. Sed la ega pacienco lia finfine konkeris ŝin, aldone al lia firmeco: li vangofrapis ŝin dufoje tre forte tiel ke ŝi trankviliĝu, kaj kiam ŝi komencis obei sian edzon ŝi ekfeliĉiĝis. Tamen, ŝia filino estas obeema jam antaŭ geedziĝo, kio mirigis patrinon,

ĉar nur kelkajn monatojn antaŭe ŝi estis tiom malobeema kiel sia patrino, kaj ankaŭ tre malĝentila. Kio okazis al ŝi, por ke ŝi ŝanĝis subite kelkajn tagojn antaŭ ŝi deksepjariĝis?

«Ne, mi ne timas, patro», ŝi diras nun. «Ĉar vi volas tion».

«Vi mankos al ni, Zorajd'. Kiu lavos miajn piedojn kiam mi venos el laborejo?», li diris malgaje.

Sed tiam la filino rigardis la patrinon.

«Edzo, mi tion faros la ceteron de mia vivo, se vi permesas».

Ibrahim' rigardadis al ambaŭ virinoj, kaj diris: «Dio benas vin, filino mia. Kaj ankaŭ vin, edzino. Mi estas bonŝanca homo».

«Dio amas vin, patro».

Post mallonga paŭzo, ŝi demandis:

«Kiam vi edzinigos min, patro?»

«Mi intencas diri al Aben' Abdala', ke la unan tagon de printempo estos bona tago. Ĉu vi jam estos preta por tiu tago, filino mia?»

«Patro, mi estas preta de la momento, kiam vi diris al mi al kiu mi edziniĝos».

«Vi ne devas fari, se vi ne volas, filino».

«Patro, mi deziras tion, kion vi volas. Kun la helpo de Dio mi lernos fari ĉion bone. Aldone mi havis bonan lernadon el via edzino, mia patrino».

Zulem' sentis larmoj en siaj okuloj. Ŝi papelbrumis rapide por ke ili ne fontis laŭ sia vizaĝo.

Kaj finfine venis la tago, kiun timas kaj samtempe deziras ĉiuj virgaj fianĉinoj, la tagon de sia edziniĝo.

La ceremonio estis longa, tre longa, kaj ĉeestis preskaŭ la tuta urbo. Estis multe da preĝo, legado de La Libro Sankta kaj poste ĉiuj, unu post la alia, diris vortojn tre belajn al la ekgeedzoj. Fine ili ambaŭ diris siajn promesojn, kiujn ŝi prenis rekte el La Libro Sankta:

Mi estos via lojala kunantino kaj donos al vi heredontojn, kiuj entreprenos vian laboron kaj vian alporton al la mondo, edzo amata.

Poste komencis manĝado, kiu daŭrigis tri tagojn. Gastoj foriris nur mallonge por necesejo kaj poste ili revenis.

Sed ĉio finas, kaj kiam gastoj jam estis for, nur restis la du geedzoj, unu apud la alia.

«Jam ĉiuj foriris», Aben' diris finfine. «Edzino, iru al nia dormoĉambro kaj pretigu ĉion, ĉar mi restos ĉi tie por preĝo por ke Dio lumigu min».

Zorajd' kisis la manon de sia jam edzo, kaj iris al ilia ĉambro per mallongaj, silentaj paŝoj, kiel decas bona, fervora, obeema edzino.

Duonhoron poste venis la ĵusa edzo. Li venis en la ĉambron per firma, sed ne brua paŝo. Ŝi rigardis lin de sub la litotuko kun iom da timo, sed montris nur okulojn kaj hararon. Ŝi konsciis, ke ŝi estis forlasante sian infanecon kaj eble inicie alian infanecon ene de ŝi.

Li venis en la liton kaj poste forprenis sian ĉemizegon. Li rigardis al sia edzino, kaj plaĉis al li tion, kion li vidis.

«Ĉu vi konas la devojn de via nova situacio, edzino?»

«Feliĉigi vin, plezurigi vin kaj venigi posteulon vian, edzo», diris Zorajd'.

Li karesis ŝian vizaĝon, kisis ŝin kaj, metante sin sur ŝin, eniris ŝin.

Zorajd' sentis molan doloron, ĉar la dureco de sia edzo ne estis tia, kia junulo. Ankaŭ ne estis tiaj lia impeto kaj malpacienco. Li puŝis malrapide, kaj ŝi helpis premante liajn renojn per siaj manoj kaj apartigante siajn krurojn plej eble kiel ŝi povis por faciligi la enkondukon de la membro portanta semon de futura vivo.

Dum tiu momento supera en sia vivo, kiam ŝi amindumis unuafoje, ŝi ne povis ne pensi pri Abdul' Saleh', pri sia vivo antaŭa kiel viro. Jes, tio estis alia sensacio: penetri kaj malŝarĝi. Tio estas tio, kion li ĉiam pensis, ke Dio volas, ke siaj bonaj filoj faru: meti sian semon en filinojn de Dio, kaj ŝanĝe al tio, La Plej Altulo provizis ilin per plezuro. Estas sengrave la plezuro de virinoj, ĉar ilia tasko estas doni novan vivon, krei novajn

gefilojn de Dio, sengrave al tio, ĉu ili sentas plezuron, ĉu ne: tio estas laboro ilia, kaj kiam oni faras laboron, oni ne pensas ĉu oni ŝatas, ĉu ne ŝatas la laboron: oni faras ĝin kaj nenio pli. Sed Zorajd' trovis, ke la procedo generi novan vivon estis plezura afero, tre plezura: post la alveno sukcesa de la edza murbatilo tra la pordo de ŝia plezuro, tuj post kiam tiom malfacile li sukcesis rompi la sigelon, kiun Dio estis metinte sur ŝia ineco tiel, ke ŝia edzo sciu, ke li estas la unua eniri tien, kiam pikis ŝin doloro kiel mola mordo, kiam la ventro de sia edzo karesis tiun ŝian, ŝi sentis ondon da plezuro, kiu invadis ŝian ventron de la interkruro, dum io de sia edzo enloĝis ŝian enon, kaj kriigis per plezuro.

«Ĉu vi fartas bone?»

«Bonege, edzo, bonvolu ne halti».

Kaj Aben' daŭrigis ĝis li mem eksplodis en ondon da plezuro. Tamen li ne haltis ĝis kiam ŝi kriis samtempe kiel li, kaj poste ili du, svetante kaj brakumante, unu sur la alia kaj perspirante, ridetante, feliĉaj. Poste li turniĝis kaj restis apud ŝi, dum ŝi alproksimigis siajn krurojn por lasi pli da loko al li. Li apogis sian manon sur la sekso de Zorajd', kaj karesis ĝin. Poste portis sian manon al brusto ŝia kaj ludis kun cico dum li suĉis la alian.

Baldaŭ mia filo suĉos tion ĉi kaj prenos eliksiron de vivo, pensis Aben'.

Do temis pri tio ĉi, pensis ŝi. Mi neniam imagis, ke virino povas senti ĝin tiel. Kaj li memoris siajn sentojn kiam li estis viro, kvankam certe li neniam amindumis, ĉar li atendis edziĝon, kaj ankaŭ ĉar li neniam trovis virinon, kiu volis fari tion kun li.

Dio ne volis tion, li pensis.

Post tiu, multaj noktoj da amo sekvis. Aben' sciis kiel atingi ŝin el sia sekso al ŝia ventro, kaj el ŝia ventro al ŝia koro. Baldaŭ ŝia korinklino, ŝia amo, saltis el ŝia koro al ŝia animo, kaj ili du jam estis nur unu sola afero. Ankaŭ, li estis atentema edzo, kiu portis al ŝi multajn detalojn al sia edzino, la plej bone vestita virino en la tuta urbo.

Unu jaron poste, ŝi naskis infanon, kiun ili nomigis Ali'. Post li venis

Fatima, bela infanino, kiun ŝi edukis en respekto al tradicio de iliaj geantaŭuloj kaj la Leĝo de Dio. Ali' kaj fratoj Ben' kaj Mustafah', ricevis edukadon de sia patro pri la arto de negoco, kaj kiam ili plenkreskis, kiam Ali' jam estis dekkvarjaraĝa, Aben' lasis la vendejon en liaj manoj kaj foriris kun siaj aliaj filoj negoci aliloke. Dume, Zorajd' restis hejme kun sia filino, Fátima, kaj kiam Ali' revenis ili manĝis familie, kaj poste li, la viro de la domo, legis por ili virinoj la vorton de Dio el La Libro, tiel ke sia fratino estu ankaŭ prudenta virino same kiel patrino.

Sed kiam Fatima jam estis dekok jaraĝa, Zorajd' songis pri Rejin'. Ŝi songis pri la ŝtonigo, tiu terura ceremonio, kaj ŝi vidis kun korpeno, ke la vizaĝo de Rejin', je la momento lia ŝtono trafis ĝin, estis tiu de Fatima, ne tiu de Rejin'. Ŝi vekigis kriante.

«Kio okazas al vi?», demandis la edzo. Li jam alproksimiĝis al sedekjaraĝo, dum ŝi venis en duonon de tio.

Ŝi rakontis sian koŝmaron, kaj timante, ke estas averto de Dio, ili decidis atenti pli al sia filino kaj edzinigi ŝin al bona homo, kiu zorgos pri ŝi, dorlotos ŝin kaj faros gefilojn al ŝi por ke ŝi ne pensu pri frenezaĵoj tipaj de ŝia aĝo.

Fátima kaj Zorajd' estis la plej piaj virinoj en la tuta urbo. Sed eĉ tiel ili decidis edzinigi ŝin jam, por eviti, ke ŝi ekfreneziĝu, same kiel Rejin' faris. Ili vizitis la imamon de la urbo, la noblan Omaron. Tiu ĉi aŭskultis atente tion, kion ili rakontis, kaj kiam li parolis, li estis tre klara:

«Ne zorgu pri via edzo, Zorajd': li ne memoros, ke li dormis».

Ŝi rigardis al Aben' kaj konstatis, ke li, vere, ekdormas sur sia seĝo.

Ŝi rigardis al Sankta Omar', kaj li ridetis al ŝi: «Ne timu», ripetis li, «li ne devas scii tion, kion maljuna Pro El Fu devas diri vin, juna Abdul' Saleh'».

Denove ŝi vidis tiun homon de la dezerto antaŭ li, kiu per okuloj de nedifinita aĝo diras al li: «Ĉu vi ankoraŭ kredas, ke Rejin' devis esti murdita de vi kaj viaj fanatikaj fidokunantoj?»

«Mi..., nobla El Pro Fu, mi scias, ke ni fie faris».

«Ĉu vi pardonas la vivon de Rejin' nun?»

Daŭrigota

La faraono

Ĉapitro 48^a

La pastro kaŝate rigardis la kronprincon kaj trovis lin tre ŝanĝita. Ramzes estis pala, preskaŭ malgrasiĝis dum kelke da horoj, liaj okuloj perdis sian brilon kaj eniĝis en la kavojn.

Aŭdinte, kion volas la Grekoj, Mentezufis eĉ unu momenton ne ŝanceliĝis redoni al ili la korpon de Patroklo.

«La Grekoj estas pravaj», diris la sankta viro, «ke ni povus turmenti la ombron de Patroklo post lia morto. Sed ili estas malsaĝuloj, supozante, ke iu egipta aŭ ĥaldea pastro farus tian krimon. Ili prenu la restaĵojn de sia samlandano, se ili kredas, ke sub la ŝirmo de iliaj moroj li estos pli feliĉa post la morto!...»

La princo senprokraste sendis oficiron kun ordono, sed li retenis Mentezufison. Videble, li volis ion diri al li, sed li ŝanceliĝis.

Post longa silento Ramzes subite demandis:

«Sendube vi scias, sankta profeto, ke unu el miaj virinoj,

Sara, mortis, kaj ke ŝia filo estis mortigita?...»

«Tio okazis en la sama nokto, en kiu ni forlasis Pi-Baston...»


La princo salte leviĝis.

«Pro la eterna Amon!...», ekkriis li. «Tio okazis antaŭ tiel longe, kaj vi nenion diris al mi?... Eĉ pri tio, ke oni min suspektis pri la mortigo de l' infano?...»

«Sinjoro», diris la pastro, «en la antaŭtago de batalo la ĉefa militestro havas nek patron, nek infanon, unuvorte li havas neniun, nur sian armeon kaj la malamikon. Ĉu en tiel gravaj cirkons-tancoj ni povis maltrankviligi vin per tiaj sciigoj?»

«Tio estas vera» respondis la princo post pripenso. «Se oni neatendite atakus nin hodiaŭ, mi ne scias, ĉu mi povus bone komandi la

armeon... Kaj entute mi ne scias, ĉu iam ajn mi rekiros la trankvilon... Tiel malgranda... tiel bela infano!... Kaj la virino, kiu sin oferis por savi min, min kiu estis tiel maljusta por



ŝi!... Neniam mi supozis, ke povas okazi tiaj malfeliĉoj kaj ke homa koro povas porti tian ŝarĝon...»

«La tempo resanigas ĉion... La tempo kaj la preĝo «murmuretis la pastro.»

La princo balancis la kapon kaj ree en la tendo ekregis tia silentoj, ke oni povis aŭdi la erojn, falantajn en la sablohorloĝo.

La princo rekonsciiĝis.

«Klarigu al mi», diris li «sankta patro «se tio ne apartenas al la grandaj misteroj, kia diferenco estas inter la bruligado de la mortinto kaj farado de mumo? Kvankam mi aŭdis ion pri tio en la lernejo, sed mi ne komprenas ĉi tiun problemon, kiun Grekoj opinias tiel grava».

«Ni opinias ĝin ankoraŭ pli grava, la plej grava», respondis la pastro. «Pri tio atestas niaj urboj de l' mortintoj, kiuj okupas la tutan teron de la okcidenta dezerto. Pri tio atestas ankaŭ niaj piramidoj, tomboj de l' faraonoj de la antikva ŝtato, kaj la mnemonioj, grandegaj tomboj, elhakitaj en la ŝtonegoj, por la reĝoj de la nuna epoko. La enterigo kaj la tombo estas gravaj aferoj, la plej gravaj homaj aferoj. En la korpa formo ni vivas kvindek aŭ cent jarojn, niaj ombroj daŭras dekojn da jarmiloj, ĝis plena

puriĝo. La asiriaj barbaroj ridas nin, ni oferas pli multe da tempo al la mortintoj ol al la vivantoj; sed ili plorus sian malzorgon pri la mortintoj, se ili konus kiel ni la misteron de la morto kaj tombo».

La princo ekstremis.

«Vi timigas min», diris li. «Ĉu vi forgesis, ke inter la mortintoj mi posedas du karajn estaĵojn, kiuj ne estas enterigitaj laŭ la egipta ceremoniaro?...»

«Kontraŭe. Ĝuste nun oni faras iliajn mumojn. Sara kaj via filo havos ĉion, kion ili bezonos en la longa migrado.

«Ĉu vere?...», demandis Ramzes preskaŭ kun ĝojo.

«Mi certigas vin, ke estas tiel», respondis la pastro, «kaj ke estos farita ĉio, kio estas necesa, por ke vi trovu ilin feliĉaj, kiam ankaŭ vin tedos la surtera vivo».

La princo aŭskultis tre kortuŝita.

«Vi do pensas, sankta viro», demandis li «ke mi retrovos iam mian filon kaj povos diri al ĉi tiu virino: Sara, mi scias, ke mi estis por vi tro severa?...»

«Mi estas tiel certa, kiel pri tio, ke mi vidas vin, nobla sinjoro.

«Parolu... parolu pri tio!...»,

ekkriis la princo. «La homo ne pensas pri la tomboj, ĝis kiam li ne metos tien parton de si mem... Kaj min, min frapis tia malfeliĉo, ĝuste en la momento, kiam mi pensis, ke ekster faraono ekzistas neniu pli potenca ol mi!»

«Vi demandis min, sinjoro», komencis Mentezufis «kia diferenco ekzistas inter la bruligado de la mortintoj kaj farado de mumo? Sama, kiel inter la detruo de la vesto kaj konservado en la ŝranko. Se la vesto estas konservata, ĝi multfoje povas ankoraŭ esti utila, kaj se vi havas nur unu, estus frenezo bruligi ĝin».

«Tion mi ne komprenas», intermetis la princo. «Tion vi ne instruas eĉ en la supera lernejo...»

«Sed ni povas diri tion al la kronprinco. Via ekscelenco scias», daŭrigis la pastro «ke la homa estaĵo konsistas el tri partoj: korpo, dia fajrero kaj ombro aŭ Ka, kiu kunigas la korpon kun la dia fajrero. Kiam la homo mortas, lia ombro kaj la fajrero foriĝas de la korpo. Se la homo vivus sen peko, lia dia fajrero kun la ombro tuj irus inter la diojn ĝui la eternan vivon. Sed ĉiu homo pekas, malpurigas sin en la mondo, kaj tial lia ombro Ka devas sin purigi, iafoje milojn da jaroj. Ĝi purigas sin tiamaniere,

ke nevidebla ĝi vagas sur nia tero, inter la homoj kaj plenumas bonajn farojn. La ombroj de la krimuloj, eĉ en la postmorta vivo krimas kaj definitive pereigas sin kaj sian dian fajron. Ne estas sendube mistero por via ekscelenco, ke la ombro Ka tute similas la homon, sed ŝajnas teksita el tre delikata nebulo. La ombro havas kapon, manojn kaj korpon, ĝi povas paŝi, paroli, ĵeti aŭ levi objektojn, kaj eĉ, precipe dum kelkcento da unuaj jaroj post la morto devas de tempo al tempo iom manĝi. Poste sufiĉas al li la bildoj de la nutraĵoj... Sed la ĉefan forton la ombro ĉerpas el la korpo, kiun ĝi lasis sur la tero. Se ni ĵetas la korpon en tombon, ĝi rapide putriĝas kaj la ombro devas sin nutri per la polvo kaj putraĵo. Se ni bruligas la korpon, la ombro havas nur cindron kiel nutraĵon. Sed se ni faras el la korpo mumon, t. e. se ni enbalzamas la korpon por jarmiloj, la ombro Ka estas ĉiam sana kaj forta kaj pasigas la tempon de la puriĝo trankvile, eĉ agrable».

«Strangaj aferoj!...», murmuretis la kronprinco.

«Pri la postmorta vivo la pastroj dum jarmilaj esploroj eksciis multajn gravajn detalojn. Oni konvinkiĝis, ke se en la korpo de la mortinto restas la internaĵoj, lia

ombro Ka havas grandegan apetiton, bezonas tiom da nutraĵo, kiom la homo; kaj kiam mankas la nutraĵo, ĝi ĵetas sin sur la vivantaj kaj elsuĉas ilian sangon. Sed se oni forigas el la korpo la internaĵojn, kiel ni faras, la ombro povas vivi preskaŭ sen nutraĵo: ĝia propra korpo, enbalzamigita kaj plenigita per bonodoraj herboj, sufiĉas al ĝi por jarmiloj. Oni konstatis ankaŭ, ke kiam la tombo de la mortinto estas malplena, la ombro sopiras al la mondo kaj senbezzone vagas sur la tero. Sed se en la postmorta kapelo ni metas vestojn, meblojn, armilojn, vazojn kaj instrumentojn, kiujn amis la mortinto; se ni kovras la murojn per pentraĵoj, prezentantaj: festenojn, ĉasojn, diservojn, militojn kaj entute okazojn, en kiuj partoprenis la mortinto, se ni aldonas statuetojn de l' personoj de lia familio, de servistoj, ĉevaloj, hundoj kaj brutoj; «tiam la ombro ne revenas senbezzone en la mondon, ĉar ĝi trovas ĝin en sia postmorta domo. Fine oni eksciis, ke multaj ombroj, eĉ plenuminte la penton, ne povas eniri en la landon de la eterna feliĉo, ĉar ili ne konas la konvenajn preĝojn, ĵurojn kaj interparoladojn kun la dioj. Ni antaŭzorgas tion, envolvante la mumojn en papirusojn, sur kiuj estas skribitaj la sentencoj, kaj

metante en iliajn ĉerkojn "La libron de l' mortintoj". Unuvorte nia funebra ceremoniaro certigas al la ombro fortojn, gardas ĝin de la maloportunaĵoj kaj de la sopiro al la tero, faciligas al ĝi la eniron inter la diojn kaj antaŭgardas la vivantojn de la malutiloj, kiujn povus kaŭzi al ili la ombroj. Nia granda zorgemo pri la mortintoj havas ĝuste tian celon; jen kial ni konstruas por ili preskaŭ palacojn kaj aranĝas tie plej elegantajn loĝejojn».

La princo momenton konsideris, fine li diris:

«Mi komprenas, ke vi faras grandan favoron al la senfortaj ombroj, provizante ilin je ĉio necesa. Sed... kiu pruvos al mi, ke la ombroj ekzistas?... Pri tio, ke ekzistas senakva dezerto «daŭrigis la princo «mi scias, ĉar mi vidas ĝin, ĉar mi dronis en ĝiaj sabloj kaj spertis ĝian fajran sunon. Pri tio, ke ekzistas landoj, kie la akvo ŝtoniĝas kaj la vaporo fariĝas blanka lanugo «mi ankaŭ scias, ĉar parolis pri tio konfidindaj atestantoj... Sed kiel vi scias pri la ombroj, kiujn vidis neniu, kaj pri ilia postmorta vivo, se neniu homo revenis de tie?»

«Vi eraras, sinjoro», respondis la pastro. «La ombroj multfoje sin montris al la homoj, eĉ rakontis al

ili siajn sekretojn. Oni povas vivi en Teboj dek jarojn kaj ne vidi pluvon; oni povas vivi sur la tero cent jarojn kaj ne vidi ombron. Sed kiu vivus centojn da jaroj en Teboj, aŭ milojn da jaroj sur la tero, vidus pli ol unu pluvon kaj pli ol unu ombron!...»

«Kiu vivis milojn da jaroj?...», demandis la princo.

«Vivis, vivas kaj vivos la sankta pastraro», respondis Mentezufis. «Ĝi antaŭ tridek mil jaroj ekloĝis sur la bordoj de Nilo, ĝi esploris dum ĉi tiu tempo la ĉielon kaj teron, ĝi kreis nian saĝon kaj desegnis la planojn de la kampoj, akvobaroj, kanaloj, piramidoj kaj temploj...»

«Tio estas vera «respondis la princo. «La pastraro estas saĝa kaj potenca, sed kie... estas la ombroj?... Kiu vidis ilin kaj parolis kun ili?...»

«Sciu pri tio, sinjoro», predikis Mentezufis «ke ombro estas en ĉiu vivanta homo. Kaj kiel ekzistas homoj, kiuj posedas grandegan forton aŭ penetreman rigardon, same ekzistas homoj, kiuj havas eksterordinaran kapablon, ke ili povas dum la vivo eligi sian propran ombron... Niaj sekretaj libroj estas plenaj de plej konfidindaj rakontoj pri ĉi tiu

temo. Pli ol unu profeto sciis fali en dormon, similan al la morto. Tiam lia ombro, eliĝinte el la korpo, en la daŭro de unu momento sin transportis Tiron, Ninivon, Babilonon, rigardis kion ĝi bezonis, aŭskultis la diskutojn, kiuj nin interesas, kaj post la vekiĝo de l' profeto, detale raportis pri ĉio. Pli ol unu malbonvola sorĉisto, same ekdorminte, sendis sian ombron en la domon de malamata homo, kaj tie renversis aŭ detruis la meblojn kaj timigis la familion. Iafoje okazis, ke la homo, atakata de la ombro de l' sorĉisto, batis ĝin per lanco aŭ glavo. Tiam en la atakata domo aperis sangaj signoj, kaj la sorĉisto havis sur sia korpo la saman vundon, kiun ricevis la ombro. Multfoje ankaŭ la ombro de vivanta homo aperis kune kun li, kelke da paŝoj de li...»

«Mi konas tiajn ombrojn!...», murmuretis ironie la princo.

«Mi devas aldoni», daŭrigis la pastro «ke ne nur la homoj, sed ankaŭ la bestoj, kreskaĵoj, ŝtonoj, konstruaĵoj kaj mebloj havas tiajn ombrojn. Sed (stranga afero?) la ombro de la senviva objekto ne estas senviva: ĝi moviĝas, transiras de unu loko en alian, eĉ pensas kaj komunikas siajn pensojn per diversaj signoj, plej ofte per frapado. Kiam la homo mortas, lia

ombro vivas kaj sin montras al la homoj. En niaj libroj oni notis milojn da tiaj okazoj. Unuj ombroj postulis nutraĵon, aliaj promenis en la loĝejo, laboris en la ĝardeno, aŭ ĉasis sur la montoj kun la ombroj de siaj hundoj kaj katoj. Aliaj timigis la homojn, detruis ilian havon, suĉis ilian sangon, eĉ logis al diboĉo... Sed estis ankaŭ bonaj ombroj: de patrinoj, gardantaj siajn infanojn; de soldatoj, avertantaj pri malamikaj embuskoj; de pastroj, kiuj malkovris al ni gravajn sekretojn... Ankoraŭ dum la 18-a dinastio la ombro de Ĥeopso (kiu terure premegis la popolon, konstruante la piramidon por si kaj pentofaras pro tio), sin montris en la nubiaj orminejoj kaj kompatanta la suferojn de la laborantaj sklavo, malkovris al ili novan fonton de akvo».

«Vi rakontas interesajn aferojn, sankta viro «respondis Ramzes «permesu do ankaŭ al mi diri ion al via ekscelenco. Foje nokte, en Pi-Bast, oni montris al mi mian ombron... Ĝi tute similis min, eĉ estis same vestita kiel mi. Sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke tio ne estas ombro, sed vivanta homo, Likon, malnobla mortiginto de mia filo... Li komencis siajn krimojn per tio, ke li persekutis la Fenicianinon Kaman. Mi promesis

rekompencan al tiu, kiu kaptos lin... Sed nia polico ne nur ne kaptis lin, sed eĉ lasis lin ŝteli la saman Kaman kaj mortigi senkulpan infanon... Hodiaŭ mi aŭdas, ke oni kaptis Kaman, sed mi scias nenion pri tiu krimulo. Verŝajne li vivas libere, sane, gaje kaj ĝuas la ŝtelitajn trezorojn; eble eĉ li preparas sin al nova krimo!...»

«Tiom da homoj persekutas ĉi tiun krimulon, ke fine oni nepre kaptos lin», diris Mentezufis. «Kaj kiam li falos en niajn manojn Egipto pagos al li la ĉagrenojn, kiujn li kaŭzis al ĝia kronprinco. Kредu al mi, sinjoro, vi povas antaŭe pardoni al li ĉiujn kulpojn, ĉar la puno egalos ilian grandecon».

«Mi preferus teni lin en mia propra mano», respondis la princo. «Dangera afero estas havi tian ombron dum la vivo!...»

Ne tre edifita per tia konkludo el la leciono, la sankta Mentezufis adiaŭis la princon. Post li eniris en la tendon Tutmozis, konigante, ke la Grekoj jam preparas la lignaron por la ĉefo kaj ke dekelko da libiaj virinoj konsentis plori dum la funebra ceremonio.

«Ni ĉeestos», diris la kronprinco. «Ĉu vi scias, ke oni

mortigis mian filon?... Tiel malgrandan infanon!... Kiam mi portis lin, li ridis kaj etendis al mi la manetojn!... Nekomprenebla afero, ke la homa koro povas enhavi tiom da malnobleco! Se Likon atencus mian vivon, mi komprenus, eĉ pardonus... Sed mortigi infanon...»

«Ĉu oni rakontis al vi pri la sindono de Sara?», demandis Tutmozis.

«Jes. Ŝajnas al mi, ke ŝi estis la plej fidela el miaj virinoj kaj ke mi maljuste agis kun ŝi... Sed kiel tio estas ebla», ekkriis la princo batante la tablon per la pugno «ke ĝis nun oni ne kaptis ankoraŭ la malnoblan Likonon?... Fenicianoj ĵuris al mi pri tio, mi promesis rekompencan al la poliestro... Io kaŝita estas en tio!...»

Tutmozis proksimiĝis al la princo kaj murmuretis:

«Estis ĉe mi sendito de Hiram, kiu, timante la koleron de l' pastroj, kaŝas sin, antaŭ kiam li forlasos Egipton... Hiram, oni diras, eksciis de la poliestro de Pi-Bast, ke... Likon estas kaptita... Sed silentu!...», diris Tutmozis kun timo.

La princo ekkoleris por unu momento, sed tuj trankviliĝis.

«Kaptita?...», ripetis li. «Kial tio estas sekreto?...»

«Ĉar la poliestro devis transdoni lin al la sankta Mefres, laŭ lia ordono en la nomo de la plej alta kolegio...»

«Ah... ah!...», ripetis la princo. «Do la respektinda Mefres kaj la plej alta kolegio bezonas la homon, kiu tiel similas min?... Ah!... Al mia infano kaj Sara ili preparas belan enterigon... ili enbalzamigas iliajn restaĵojn... Sed la mortiginton ili kaŝas en sendanĝera loko... Ah!... Ankaŭ la sankta Mentzufis estas granda saĝulo. Li rakontis al mi hodiaŭ ĉiujn misterojn de l' postmorta vivo, klarigis la tutan funebran ceremoniaron, kvazaŭ mi mem estus pastro almenaŭ de la tria rango. Sed pri la aresto de Likon kaj ke Mefres kaŝas la mortiginton li ne diris eĉ unu vorton... Ah...»

«Ŝajnas al mi, sinjoro, ke tio ne devas mirigi vin», intermetis Tutmozis. «Vi scias, ke la pastroj jam suspektas vin pri malbonvolo kaj estas singardaj... Tiom pli...»

«Kio?...»

«Ke lia sankteco estas tre malsana. Tre...»

«Ah... ah!... mia patro estas tre malsana, kaj dume **Daŭrigota** onto

Dekses tunoj

«Dekses tunoj" estas kanto, kiun mi konis per profunda voĉo de hispana kataluno José Guardiola. Poste mi trovis, ke la kanton verkis usona gitaristo Merle Travis, kiu per ĝi denoncis ekspluatadon de ministoj, kiujn ties dungantoj postulis pli da mono por manĝado kaj loĝado ol ili produktis per sia laboro, ĉar ili devis produkti deksex tunojn da krudmaterialo monate por pagi, kaj tio estis nebla.

Strange, la trafenestrigo de Kristin' Cifuentes malperdigis al Partio Popola ekzakte tiun kvanton, €16 milionojn en salajroj por siaj partianoj dungitaj en la Madrida Komunumo, kiujn estus maldungitaj favore al partio socialisma, se ŝi ne renoncus, sed la deputitoj voĉdonus kontraŭ ŝi. Al kiu favoras ŝian renoncon? Evidente, al PP, kaj pro tio evidentiĝas, ke la trafenestrigo ŝuldiĝas al ĝi.

Sed eskapas al ĝenerala opinio de Hispanio, ke multe pli grave ol tio, ke politikistino rabu en privata vendejo, estas ke ni civitanoj ne povos forigi el sia ofico politikistojn, kiuj ne plenumas sian oficon, ne agas favore al la popoolo, aŭ eĉ ili simple ne plenumas la promesojn prielektajn. Jes, se oni zorge legas la Hispanan Konstitucion, kiujn kelkaj politikistoj verkis kaj donacis al ni, oni trovos nenie procedon fari tion. Do, oni elektas kvarjarlongdaŭran diktatoron per tiu voĉdonado al kandidatoj de partioj politikaj prezentataj, sed ne lasante nin ŝancon elekti ilin, nur voĉdoni. Kaj tion oni nomas demokration! Sed en demokratio, civitanoj elektas, ne nur voĉdonas.

Pro tio mi sentas min same kiel devus senti sin la ministoj de graflando Muhlenbert, Kentucky, kies drama situacio rakontis Merle Travis kaj Jozefo Guardiola, ĉar same kiel al ili oni postulis dek ses tunojn tiel, ke ili ne rajtis morti, ĉar siaj animoj apartenis al la firmaa vendejo, tiun ĉi partiŝtato montras, ke ĝi kontrolas nin ĉiujn, ĝi scias ĉion, kion ni faras, pere de siaj filmiloj distribuitaj ĉie en la lando, kaj ĝi povas ĉantaĝi nin laŭ sia intereso. Pro tio mi opinias, ke oni ne devas lasi sin venki de moralaĉo obsoleta je la jarcento 21^a. Ni bezonas bonajn administrantojn, ne bonulojn. Sed tio ne venos ĝis kiam ni havos respublikon, la sistemo politika de ĉiuj por ĉiuj. Do, ni krii kune, ke Vivu la Respubliko!



Kajeroj el la Sudo

*Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj*



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels99.pdf>



ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88